

William Wordsworth,

Dafodiloj

tradukita de Krys Ungar

Mi vagis sola kiel nub'
Altflosas super la kampar'
Kaj tiam tuj aperis trup'
De dafodiloj; ora ar'
Apud la lag', sub arba tend'
Flirtis kaj dancis en la vent'.

Senbreĉe kiel astra bril'
Sur Lakta Voj' flagretas, jen
Sterniĝis ili en defil'
Senfine laŭ la laghaven'.
Rigardon kaptis la balanc'
De dekmil kapoj en la danc'.

Apudaj ondoj dancis, sed
Triumfon gajnis floroj ĉi,
Devigis gajon de poet'
Plej joviala kompani':
Mi rigardadis sen atent',
Ke min riĉigos la prezent'.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi
Penseme, aŭ en menslangvor',
Ekfulmas ili tra l' konsci' -
La beno de solema hor';
La koro pro pleniga ĝu'
Kun dafodiloj dancas plu.

...

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de WILLIAM WORDSWORTH (*1770 – †1850) en Esperanton de KRYŠ UNGAR (Krys Bottrill).*

Arg-39-632 (2009-09-20 15:01:36)